



La Suda Kruco

*Organo de la Internacia Lingvo Esperanto en
Australazio.*
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Bex 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 humeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencej. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencej.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 111 (Ninth Year) Melburno (Melbourne), Australio. 10 Septembro 1929

ESPERANTO.

A concise History of the International Language.

(By Wm. King, D.B.E.A., Secretary
N.Z.E.A., Wellington, N.Z.)

Approximately 40 years ago—in 1887—there was one Esperantist in the world—the creator of the language, Dr. Zamenhof. Two years later the first Esperanto gazette was published, and five years after the birth of the language the founding at St. Petersburg of the first Esperanto Society followed. The French Esperanto Society was the second established—in 1898; and, in 1903, Spain came third and Britain fourth with national societies. The language spread with surprising rapidity, largely due to the holding of the world congresses of Esperanto yearly from 1905, when the first such congress took place at Boulogne, France, and to the efforts of the Universal Esperanto Association, founded at Geneva in 1908.

The position in 1911, was, briefly, as follows:— There were 765 delegates in 872 localities in 44 lands, and the membership comprised some 7,500 members; and 26 national associations of Esperantists disseminated the language. In addition, 14 Esperanto newspapers were being published.

In 1914 there were 1574 associations registered in 24 different countries. In 1922, Esperanto was taught in 320 towns in 17 different countries, and in evening classes in

1200 towns in 39 different countries. Besides being investigated by the League of Nations in 1922, Esperanto was considered in the same year by educationists from 28 countries (including 16 Governments) at Geneva. The Conference issued a manifesto to the teaching profession of the world, recommending the instruction of the language in the schools.

During the following year—1923, there was held in Venice a commercial conference in which were represented over 200 commercial and touring organisations from 23 different countries in Europe, Africa, America, Asia and Australasia. Included in the organisations represented were the International Labor Office of the League of Nations, Ministries of Industries and commerce of Austria, Czechoslovakia, Germany, Italy, Rumania, Persia; 23 Trade Fairs comprising the most important in the world; 72 Chambers of Commerce, of various countries of the five continents; 30 touring organisations; and a miscellany of organisations consisting of Rotary Clubs, commercial schools, banking, manufacturing groups, and others. The business of the conference was conducted throughout entirely in Esperanto without difficulty; and the conference brought home the fact that Esperanto stands as one of the necessary instruments for international commerce. Several recommendations were made, the main one being for the instruction of Esperanto in the commercial schools of all countries.

Although the League of Nations had thoroughly investigated Esperanto in 1922, and recommended its introduction into the schools of the world, the League again in 1924 supported Esperanto, on this occasion recommending that all State Members grant Esperanto the treatment and charges in force for a clear language in telegraphic and radio - telegraphic communications. This recommendation gave Esperanto its status as a modern language. In the meantime, Esperanto had been accepted and recommended by the British, French, and Italian Associations for the Advancement of Science, by the Preliminary Conference for the International Agreement on Wireless Telephony at Geneva, and by the American Radio Relay League. This advance took place in 1924. It is interesting to note that in this same year the Department of Psychology at Wellesley College (U.S.A.), decided to try a language experiment to determine whether Esperanto is as easy to learn as ordinary modern languages. After a careful and scientific comparison, without bias or prejudice, a report proving the facility of an artificial language was issued. Another attraction during this year was the broadcasting of an Esperanto translation of the King's speech on the occasion of the opening of the British Empire Exhibition at Wembley, the speech being received and understood in 18 countries.

In 1925, the International Telegraph Union, comprising the various countries of the world, New Zealand included, put into effect the recommendations of the 5th Assembly of the League of Nations relative to Esperanto in telegraphic and radio-telegraphic use. In July of the same year, the first session of the Esperanto Summer University was held at Geneva, which introduced a new departure in international life and thought. Four departments were provided, namely—(1) Psychology and Pedagogy; (2) Linguistic Science; (3) Physical Sciences and Technics (including Radio); and (4) International Organisation Law. Professors and students alike from all countries were present, instructing each other in one language only—Esperanto. During the same year (1925), 28 European radio-stations

were broadcasting regularly Esperanto lessons and speeches; and the first postage stamp with Esperanto text was issued.

Many international and national congresses were held in 1926, many of them using or recommending Esperanto. During the year the complete Bible was published in Esperanto by the British and Foreign Bible Society.

(To be continued).

Fairs.

The international fairs continue to use Esperanto. The Budapest Fair has once more issued a prospectus in that language; the Fairs of Frankfurt-on-Main, Rome and Paris have done the same.

University Courses in Esperanto.

University Courses will once more be held in the present year in conjunction with the Twenty-first Universal Esperanto Congress at Budapest, from 2nd to 9th August. A number of eminent men of various nationalities will give scientific or technical lectures in Esperanto. The programme is as follows:—

Philology: Mr. H. Skold, Lecturer at the University of Lund (Sweden): "The Linguistic Situation in the Far East." Dr. Dreher, Cracow: Anglo-Franco-German Comparative Linguistics." **Philosophy:** Dr. Joh Kiss, Papal Prelate, Professor at the University and Director of the Collegium Medium, Budapest: "The Nature, Origin and Value of human knowledge." **Physics:** Dr. Lazlo de Rhorer, Professor at the University of Pecs: "Television"; **Geology:** Dr. Gyula Rakusz, of the University of Budapest: "Formation and Destruction of Mountains." **Literature:** Mr. Bela Vikar, Former Chief of the Stenographic Office of the Houses of Parliament, Budapest: "Hungarian Literature." **Medicine:** Dr. Giorgio Canuto, Professor at the University of Turin: "Evolution and Present Application of Forensic Medicine." **Law:** Mr. Andres Pino, Advocate of Valencia (Spain): "Preste Victoria and the Spanish Literature of Public International Law." Mr. C. C. Tarelli

of the International Labor Office; General Solicitor of the Supreme Court in England: "The International Labor Organisation and Forced Labor among Natives."

RECENZO.

NOBELA PEKO, EL LA RUMANA de M. Sadoveanu, trad. de Tiberio Morariu, brile ornamas per sia majstra lingvaĵo nian templon de l'verkajoj. La ĉefa enhavero rakontas pri nobela ankrimo kaj pri revenĝo de simplula patro al la filo de la ofendinto. Mihail Sadoveanu estas la plej forta k. valorplena nuntempa prozisto rumana, kaj verkas en la plej bela k. originala lingvo; sendube tiuj ecoj klare respeguliĝas en la Esperantaĵo de s-ro Morariu, kiu, ĉiam riĉesprimanta, foje rememorigas pri la lingva facilfandado de Baghy aŭ Forge. Vere ni vidas ĉe nia lingvo (voĉkaskadoj, voĉkaoso, voĉŝiraĵoj) senfundan minejon de novaj pensesperimiloj: taŭgaj por kapti ĉe la plej delikatajn konceptojn.

La uzo de "ene" ne estas ĉiufoje klara: "pasinto" (pasinteco), "nekonato" (nekonateco); "krusto" 27 (arboŝelo?); ĉu estas naciismo duobligi formojn jene: tujtuje, nur-nure, solsula, foje-foje, apenaŭ-apenaŭ, ververe? "ŝi rigardis min per okuloj mallumaj, kaj sen scii, kion ŝi diru" lau konstruo estas kritikebla. Ĉu ne plibone, "mallumaj, ne sciante"? 34, decidite (—inte); "furoro (kolerego, furiozo); 39, "la aeron de mia junaĝo" ne glate legiĝas. Kial "bon'-tagon"? Ventregeto!

Krom la titolverko la volumo donas "En Arbaro Petriŝora," pri kiu Petro Stojan, L.K., diras, "La belstila 'P. Arbaro' estas unu el la plej belaj juveloj de la E-ta literaturo; en ĝi estas atingita la plej alta punkto de la stila perfekteco." Ankaŭ "La Sciĝantoj," beleta skizo de kristnaska kutimo k. infana vivo.

Modele presita, belriĉa enhavo, kiu estas, pro la kreipova bonstilo de la tradukinto, feliĉe libera de la malbeninda enfluo de neologismoj. Prezo 11 sil. ĉe AEA, aŭ Hirt und Sohn, Leipzig, Germ.

—Robo.

SCOUTS AND THE LANGUAGE DIFFICULTY.

It, according to the cable news of 12th August, the use of English was general at the International Jam-boree at Arrowe Park, England, why were found necessary "attempts by

the boys (!) to evolve a world tongue" of their own? The information further given, that one per cent. of the scouts present spoke Esperanto should encourage us, knowing as we do that the I.L. has been propagated only 42 years. The 500 progressive scouts who formed the 1 per cent. were doubtless splendid advertisement for Esperanto in a responsive medium.

It is safe to say that the lads using the tongue of Zamenhof got on far better than those dependent on "sign language," which we are told was widely used.

The possession of language marks man from the beast, and the use of this mis-named "sign language" is surely a reversion to the gibbering of the tree dweller, unworthy of adoption by Homo sapiens. Such an artifice may serve for expression of the simplest needs, and indeed has served to some end among primitive peoples, but should the services of a gesture expert be enlisted to add proceedings at an International Conference composed of beings higher in the mental scale than troglodytes, he would find his style badly cramped.

ROBO.

ESPERANTO IN N.Z. SCHOOLS. Deputation to Minister of Education.

A deputation representative of Esperantists and educationists was introduced on the 12th of July last by the Rev. Clyde Carr, M.P., and member N.Z.E.A., to the Minister of Education (Mr. H. Atmore) at Wellington, for the purpose of placing information before the Minister with a view to the inclusion of Esperanto in the curricula of N.Z. schools and colleges. In the deputation were Mr. W. King, Hon. secretary, N.Z.E.A.; Messrs. W. L. Edmanson, E. Jack, and Bertram Potts, of the Wellington Esp. Club; Mr. E. Lomas, Principal, Wellington Training College; Mr. H. Amos, Managing Director, Banks College, Wellington; Mr. F. Combs, Headmaster, Mt. Cook School; Mr. R. Lochore, Wellerley College; and Mr. H. Armstrong, M.P.

Mr. King urged that Esperanto be included in the curricula of the primary, secondary and technical schools and universities of the Dominion. The New Zealand Esperanto Association desired—

The introduction of Esperanto as a subject of study for the higher standards in the primary schools. As an optional language subject in secondary schools.

As a subject in the training colleges. As an optional language for University examinations.

As a subject in the commercial course in technical schools.

Mr. King said the time devoted to Esperanto would aid in the study of English and create interest in history and geography.

Numerous countries had introduced Esperanto into certain schools with splendid results.

Esperanto could be read and written after one year's study, and spoken fluently after two years, while the speedy acquisition of root words lessened the time required for French and Latin. Prof. J. Findlay, one of the highest educational authorities of the world, and examiner in education for the N.Z. University, advocated the introduction of Esperanto into the schools.

It had stood up to every test over a period of over forty years and had sufficient support to warrant New Zealand taking the important step which the deputation advocated and again leading the world in a great reform.

Mr. W. Edmanson related his experiences with nationals of other countries who spoke Esperanto.

Mr. E. Lomas said the pupil teachers had shown facility in acquiring the language. A quarter of an hour a day on two days of the week had been devoted at the Wellington Training College to a voluntary study of the language. The principals of the Auckland Training College approved of the language.

Mr. H. Amos said he had visited no fewer than four international conferences at which the language difficulty had been so marked that discussion had been almost impossible. He strongly urged the Minister to accord his support to the representations of the deputation.

Minister's interim reply.

The Minister stated that he was much impressed with the necessity for an international language, but that the distance from the Continental countries minimised to some extent the urgency of the need for such a language in New Zealand. He, however, would

give the matter careful consideration and discuss it with his colleagues and would inform the deputation of the decision at a later date.

Mr. Carr, on behalf of the deputation, thanked the Minister for his sympathetic reception of the deputation.

ALVOKO.

Emilo Chudoba, 21-jara fraŭlo, Stonava, Silezio-Ceĥoslovakio, deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj per leteroj kaj p.kartoj ilus. bildflanke afrankitaj. Interŝanĝas p.markojn k esperantajojn. Skribu multnombro. Neniu restos sen respondo.

ERAROJ.

Pg. 102, Kol. 1, linio 8. legu: Kirliĝantoj. Pg. 105, Kol. 1, linio 30. legu: Kies (ne, Kiel).

GRATULON.

S-ro Alastair More, sek-io de la Christchurch Esp. Societo, sukcesis ĉe D.B.E.A. Ekzameno. Al li gratulon!

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Danke ni Kvitancaŝ ricevon de abonoj jene:— s-ino James 10/-, febo, '32; W. Hill, 4/6, junio, '30; R. Worrall, 4/6, julio, '30; s-ino Purnell, 4/6, junio, '30; f-ino Hopton, 4/6, junio, '30; s-ro Hayes-Williams, 9/-, aprilo, '31; f-ino H. Batchelor, 5/-, junio, '30; s-ro Dewar, 5/-, aŭg., '30; s-ino A. Carter, 4/6, junio, '30; M. Ravelick, 5/-, majo, '30; f-ino C. Hannaford, 4/6, junio, '30; A. Saar, 5/-, junio, '30; f-ino Holdensen, 4/6, junio, '30; H. Tilbury, 4/6, junio, '30; S. Bishop, 4/6, junio, '30; f-ino D. Bell, 4/6, julio, '30; J. Hodges, 5/-, junio, '30; G. Gordon, 5/-, junio, '30; A. More, 5/-, aŭg., '30; s-ino Callinan, 6/-, dec., '29.

KURSO PER TRADUKADO.

(kondukata de s-ro G. Gordon, F.B.E.A.) Sek-ino: Miss B. Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, Melbourne, E.10.

TRADUKO 1

GIPPSLANDA MISTERO.

El "The Age" (Melb.) de la 5a de Nov/o 1928.

Antaŭ ĉirkaŭ okdek jaroj la malgranda blankula loĝantaro de Gippsland (3) en Viktorio tre emociiĝis (4) pro strangaj raportoj, ke blanka samrasa virino falis en la manojn de la indiĝenaj gentoj. La faktoj pri la malapero de la virino estas malmultaj, sed tre eble ankoraŭ vivas (4) homoj,



kies gepatroj memoris la kaŭzitan maltrankvilon kaj la sendon de armita ekspedicio por traserĉi la arbarojn kaj montetojn. En la nebletoj de longe pasintaj jaroj la epizodo jam ŝajnas kvazaŭ stranga peco de Aŭstralia mitologio komparebla kun tio de la antikvaj Grekoj. Sendube estas, ke iuj blankulaj kolonietanoj kredis, ke la virino estas (11) kun la nigruloj, kaj ĝis nun ne kontentige (5) klarigis (4) iuj aŭtentikaj pecetoj de atesto, sugestiantaj (6) la aleston de blanka virino inter la indiĝenoj. En unu serĉa ekspedicio estis indiĝena knabino, kiun diris, ke ŝi mem ne nur vidis la virinon sed ankaŭ ludis kun ties infanoj.

Homoj maltrankviligitaj de tiuj raportoj menciis la aferon de William Buckley (ŭilŭim bokle) la soldato-malliberulo, kiu surbordigite (5) ĉe Sorrento (3) en la jaro mil-okcent-tria (7), forkuris en la sovaĝan teron (8). Li kaj liaj du kunforkurintoj (9) disiĝis, kaj Buckley vagadis sola en la daŭro de unu jaro kaj kelkan tempon loĝis en kaverno. Unu tagon li vidis indiĝenojn timomire observantajn (6) lin de sur monteto. Evidente estas (10), ke ili supozis, ke li estas (11) spirito reveninta. (6) sur la teron, kaj lia giganta alto de ses futoj kaj kvin inĉoj (195 centimetroj) helpis savi lin de ilia malamikeco. Almenaŭ li kunigis kun la nigruloj kaj vivis laŭ ilia maniero en la daŭro de tridek du (7) jaroj. Kiam la kunularo de Batman trovis lin en la ĵaro mil-okcent-tridek-kvina. (7), Buckley jam ne povis paroli sian nacian lingvon, kaj laŭ sia eksteraĵo li similis la nigrulojn. Lia korpo, estis kolorigita per ruĝa okro kaj aliaj farboj.

Ĉar tia sorto trafis Buckley, kial do, demandis la kolonietanoj, ĝi ne povus trafi ankaŭ virinon? La putriĝantaj lignaĵoj de kelkaj grandaj ŝipoj kuŝis sur la sabloj kaj malprofundaĵoj de Wilson's Promontory (3) ĝis Gabo (gebo). Estis (10) supozeble, ke saviĝintoj (9) el tiuj ŝiprompoj sin trenis surborden, vagadis en la regiono

kaj renkontiĝis kun malamikaj gentoj. Senarmilaj, senfortiĝintaj (6) homoj estas facile trafebblaj per la sagoj kaj lancoj de sovaĝuloj, kiuj verŝajne ne mortigis la virinon. En la frua parto de la nuna jarcento maljuna nigrulo, loĝanta (6) en misiejo, diris, ke la virino estis la edzino de ministro kaj akompanis sian edzon al Stockyard Creek (stokjard krik) en la tempo de la enkurado de multenombraj orministoj en la regionon. Tamen tiu historio certe ne estas vera, ĉar Gippsland dum kelke da jaroj post la serĉado por la virino ne altiris la atenton de orministoj.

(daurigota)

Notaro.

1. Estas neeble, ke mi "korektu" la tradukojn de kursanoj, kaj kvankam mi iufoje krajone montras eraron, oni ne pro tio komprenu, ke ne ekzistas pluaj. Per miaj traduko kaj notaro oni penu plibonigu sian tradukon kaj reskribu ĝin.—2. Kiam gramatika punkto estas sufiĉe klarigita en "Esperanto Grammar and Commentary" de Cox aŭ en "Lingvaj Respondoj" (L.R.) de Zamenhof, mi ordinare ne plu klarigos ĝin sed faros referencon al la rilata paragrafo en tiu aŭ la paĝo en tiu ĉi altvalora verko. — 3. Ne esperantigu nomojn de lokoj ne universale konataj.—4. "emociigi," "falis," "vivas," "klarigis." Tiuj simplaj verbtempoj estas por eviti uzon de kunmetitaj verbtempoj (estis emociitaj, estis falinta, estas vivantaj, estas klarigitaj). Cox 222, 169, 226a kaj piednoto sur paĝo 266 (aŭ paĝo 255 en pli fruaj eldonoj).—5. Adverba participo. Cox 207-212.—6. "sugestiantaj," "reveninta," "observantaj." Adjektiva participo estas tre ofte uzata anstataŭ "kiu" kun verbtempo (kiu sugestis, kiu revenis, kiu observas). Cox 207-213.—7. Kvankam ordinare oni cifere skribas datojn kaj nombrojn, oni en la nuna kurso preferinde skribu ilin per vortoj por kutimigi sin al ĝusta skribado kaj legado de ili.—8. "bush" en Aŭstralio ne ĉiam signifas "forest." Iom bona sinonimo estas

DO YOU ENJOY GOOD HEALTH?

SANA—SANA—SANIGA.

Thanks to Esperanto, Australia is now able to benefit from Switzerland's foremost medical discovery, NOVOCHIMOSIN (Novo-Kim) which is a remedy for every type of gastro-intestinal disorder and its sequels. "Incurable" cases yield to this remedy, which contains no drugs or chemicals being a biological product.

All chemists CAN supply "Novo-Kim" or it will be forwarded upon receipt of a P.N. for 5/- by the agents: The Saniga Company of Australia, P.O. Box 1106, Melbourne.

"wilderness," kiu povas esti aŭ "forest" aŭ sovaĝa senarba regiono.—9. Substantiva participio, Cox 209-210.—10. Pri senpersonaj verboj, Cox 164.—11. "estas" ne "estis," Cox 220, 221. Rimarku, ke ĉe Cox 221 "of speaking" devas esti "spoken of."

LA LASTAJ SUFEROJ DE LA MAJSTRO.

Antaŭ dekdu jaroj, la 14 de aprilo 1917, mortis en Varsovio Zamenhof. Nia pola samideano, St. Essigman, rakontis kelkajn lastajn okazintaĵojn en la vivo de la Majstro. El tiu rakonto ni ĉerpis jenon:—

En la centro de la ĉefurbo Varsovio troviĝas ducentjara ĝardeno nomita "Saksa" pro rememoraĵo de iama saksa dinastio, kiu tiutempe regis en Polujo. La ĝardeno kun multaj malnovaj arboj, kun belaj floroj kaj plautajoj, ombroplenaj aleoj, estas agrabla loko de ripozo. Sur unu el la benkoj en aleo proksima de strato Krolewska ofte sidadis la Majstro. Kun la kapo klinita, profunde enpensisinta, li ŝajnis ripozi trankvile, indiferece rigardante la ĉirkaŭon. Tiun trankvilecon de tempo al tempo interrompintis preterpasantoj, kiuj, ekkoninte la sidanton, respektoplene deprenadis ĉapojn, salutante lin. La Majstro ĝentile resalutadis.

Tiuj salutoj ŝajnis ripetadi tro ofte kaj supezeble maltrankviligis jam troe la Majstron, ĉar li, por eviti tion, ŝanĝis la lokon, eksidante poste ĉe pli trankvila flankala aleo, tra kiu ne pasis homamaso.

Ofte dum someraj tagoj de 1915-1916 li ripozadis tie, trankvila, preskaŭ senmova, enprofundiĝinte en iajn gravajn, eble malgajajn, pensojn. Dum du horoj aŭ pli, li sidis tiel, antaŭtagmeze, de tempo al tempo ekmoviĝante por fari iajn notetojn sur papereto aŭ notlibreto. Estas inde substreki, ke inter la labormaniero de la Majstro kaj tiu de la Prezidanto de Pola Esperantista Societo, Grabowski, estis certa simileco. Ili ambaŭ tute spontane, senimite notis kutime ĵus alvenintajn pensojn, ideojn, konceptojn, kvazaŭ timante, ke moviĝema torrento de pensoj, trafinta senĉese iliajn cerbojn, forportos sen revene iun bonan penson, kiel brilantan guton.

Post la ripozo la Majstro ekstaris kaj per paŝo malrapida direktiĝis al la domo ĉe la strato Krolewska, 41, kie li translokiĝis de strato Dzika en la jaro 1915.

Ŝajnis, ke la translokiĝo en novan, tre oportunan loĝejon, en bona kvartalo, proksime de vasta ĝardeno, bone influis la sanostaton de la Majstro. Tiu ĉi espero estis tamen vana. La ĉagrenoplena afero kun "Pola Esperantisto," la malsukcesa vojaĝo al Pariza Kongreso, kiun li estis devigita interrompi en Germanujo kaj revojaĝi en tre malbonaj cirkonstancoj Varsovia, la milito kun ĝiaj konsekvencoj, akraj atakoj de plej gravaj polaj gazetoj kontraŭ lia persono kaj esperantismo, kaj fine sciigo pri morto de lia frato Aleksandro, kiu estis deviga milita kuracisto en rusa armeo, — ĉio ĉi deprimis lin tre forte kaj havis tre malbonan influon sur lin, jam de longe malbonstatan. La kor-atakoj, kiuj antaŭe okazis malofte, ripetadis nun pli kaj pli ofte, suferigante la Majstron treege, kaj malfortigante lian koron, kiu la 14 de aprilo 1917 ĉesis bati por ĉiam.

SCIENCA PROGRESO?

En Sovjetunio Profesoro S. Bruhonenko „sukcesis“ detranĉi kapojn de vivantaj hundoj, ligi la organojn de la detranĉita kapo al maŝino, kiu pumpis aeron kaj sangon, kaj atingi, ke la kapo sola vivis ankoraŭ dum du ĝis tri horoj, montrante per grincado de dentoj, per okulreagado, per lekado ktp. siajn funkciojn. Detalojn pri la eksperimentoj oni trovas en „Heroldo de Esperanto“ n-ro 506.

Germana Medicina Revuo diras, ke ekzistas tiel la ebleco, revivigi ankaŭ homajn kapojn, kaj ke oni povus uzi por tia eksperimento la kapojn de ekzekutitoj. Berlina sinjorino skribis indignite pri tio ĉi al la verkisto

George Bernard Shaw,

kaj kiel respondon ŝi ricevis jenan ironian leteron de la 12.3.1929:

Estimata sinjorino:

Laŭ mia opinio la Bruhonenko-eksperimento estas interesea; sed ŝajnas al mi, ke la ideo, ripeti ĝin je mortkondamnitaj krimuloj, estas tute absurda. Ne estas dezirinde, plilongigi la vivon de tiaj personoj. La eksperimento devus esti provata per eminentulo de la scienco, kies vivo estas minacata de iu nekuracebla malsano (ekzemple stomakkancero), kiu povus rabi de la homaro la trezorojn de lia cerbo. Kio estos pli facila, ol savi tian geniulon de la morto per tio, ke oni fortranĉas lian kapon? Tiam oni liberigas lian cerbon de kancero kaj daŭrigas la necesan sangocirkuladon por la detranĉitaj vejnoj, por ke la

eminentulo povu daŭre fari al ni prelegojn, instrui nin, doni konsilojn al ni, ne estante ĝenata de la difektoj de sia korpo.

Mi eĉ mer sentas la tenton, fortranĉigi de mi la kapon, por ke mi povu plue dikti teatraĵojn kaj librojn sen la ĝeno de malsanoj kaj sen la neceso, vesti min, senvestigi min, manĝi, mallonge, sen la bezono fari iun ajn krom produkti majstroverkojn de arto kaj literaturo.

Kompreneble, mi atendus, ke unue unu aŭ du vivisekistoj mem submetigu al la eksperimento, por konvinki min, ke ĝi estas praktikebla kaj sendanĝera; sed mi supozas, ke tio al ili ne kaŭzus malfacilaĵon.

Mi multe dankas vin pro tio, ke vi turnis mian atenton al tiu ĉi tre ĝojiga ebleco. Universitato, kies fakultatoj senescepte estus direktataj de la plej delikataj cerboj de la lando kun nenio alia ol pumpilo kiel korpa organo, do universitato, kies tuta instrua agado estus pure cerba agado, signifus grandan progreson kompare kun la nuna stato.

Estus agrable al mi, se vi publikigus laŭeble plej vaste la entuziasmon, per kiu mi salutas tiun lastan triumfon de fiziologia esploro.

Sindone, via G. BERNARD SHAW.

KRONIKO.

SYDNEY. — Ni preparas grupeton por la internacia balo, organizita ĉiujare de la Unio de la Ligo de Nacioj en Sydney. Tiu arango brile sukcesis lastan jaron, altrinte al si atenton ĉe la fremdlanda konsularo. En julio s-ro H. Torr alparolis la grupon pri la Historio de Ĝ-to, tuŝante krome sur I.L. problemon en antikvaj tempoj. S-ro L.E. Pfahl ankaŭ lektiis, havanta temon La Mikrobĉasistoj.

Flirtigante devizojn Esp-varbilajn la Esp-Societo kune kun aliaj paciferemaj asocioj je la 4 Aŭgusto partoprenis stratmarŝon al demonstracio kontraŭ milita sur la Domain (Placo).

MELBOURNE, Viktorio — El ĉiu monato oni dediĉas al tradukado la duan mardon, kaj la partoprenantoj

faras bonan progreson. Pro la foresto de s-ro P. Hudson, s-ro C. Ballard nun gvidas la kurson kaj atingis grandan sukceson.

Post tre vigla konkurado inter la anoj, s-ro C. Ballard estis la gajnanto en malgranda Esp. konkurso kiu estis ero sur la Aŭgusta programo.

Ankoraŭ unu fojoh, je la unua de Aŭgusto, la esperantistoj alestis ĉe la "Rivoli" por ĝui la plezurojn de la dancado kaj interparolado.

AUCKLAND, N.Z. — Pro kreskego de la anonombro, necesas ke la klubo translokiĝu al pli tenipova ejo, k kunvenu semajne anst. monate. Tial kunvenoj okazos lunde en Room 6, Unity Bldgs., Upper Queen's str. La 22an de julio ni bonvenigis s-ron Gregory, el Dargaville, k elektis oficistojn. Rea prez., s-ro J. Russell; vicprez., s-roj E. Clark k Woodward k p-tro Wooloxall; sek-io k kasisto, s-ro E. Watkin; helpsek-io, s-ino Drury; instruistoj, s-ino Watkin, s-ro Clark k p-tro Wooloxall.

De post nia deputacio ĉe Wellington la 12an de julio al la Eduka ministro, polemiko flamis tra tagjurnalo Star. Trafaj faktoj pri E. enpikiĝis, k ŝajne tio alportis al ni profiton, ĉar iuj novaj lernvoluloj aliĝis al ni.

HAMILTON. — Pasintmonate la societo perdsente adiaŭis al f-ino C. Murray, forirantan al la Solomon'aj Insuloj. Antaŭ iom da tempo f-ino Rucroft, societano, iris Anglujon. Tial ke nia instruisto, s-ro Adcock, baldaŭ translokiĝos al Drury, ni decidis kunveni denun nur monate.

MASTERTON. — La grupo la 5an de aŭg. okazigis vesperon specialan. S-ro A. Dewar prezidis antaŭ ĉ. 30 p. Guriĉa programo jenis: Kantoj, f-ino Jamieson, s-ino Rosewarne, s-ro Garvich; deklamoj, s-inoj Spiers k L. Payne; komedio, f-inoj Rosewarne k Robertson; muziko, s-roj Bullock k Green; dancado k ludoj, tiam finfine manĝeto provizita de la membrinoj. Forta diskonigo de E. per tagjurnaloj daŭras. En julio-aŭgusto s-ino

HAROLD PUDNEY

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon poŝtu ĝin al li kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM Aŭ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson.

Specialisto pri Fontanplumoj

Li malhelpas vian skribadon poŝtu ĝin al li kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM Aŭ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson.

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

L. Payne verkis koncizartikole pri la aprobakiro de E., ĝiaj ĉiam pli oftigantaj sukcesoj. Efika agado.

WELLINGTON. — Laŭtende la Esp-deputacio al la Eduka ministro (v. alikolone) la 12an de julio metis E-ton en la publikan penson. Gazetoj raportis; la celon, bezonon k. utilon de I.L. ili frape surmontris. Avantaĝoj rezulte el tiu deputacio evidentigas ĉie, k. ŝajnas ke eĉ pli heligos la estonteco por E. en N.Z.

Nuntempe la klubo konsistas el 6-50 financaj anoj. La klubo funkcias marde. Progreson oni faras. Ĉiu klubvespero estas edukplena k. dediĉita tute al E.; 8a ĝis 9a instruado (4 klasoj, ĉiu kun instruisto) k. 9a ĝis 10a, Esp-aj programeroj. Precipe valora estas humorornamita teatraĵo, la Komercisto Reklamas, verkita de f-ino Smythson, nia vicprez.

S-ro G. Wheeler, el Christch., trapasis Wellington. Sorbigita de Esp-o, li, vera torĉo de entuziasmo, parolas karlingve tiel flue, kiel "enlandano," k. in-ter-az koresponde centon da freŝaj batala(o)ntoj por nia ideo. Admirinda laboro.

CHRISTCHURCH. — La societo ankoraŭ progresas. La ancifero estas jam nun 34. Por ke la soc. posedu standardon, ano taŭge desegnis, k. laŭ tio anino fabriki bravan flirtigilon el atlaso, jam preskaŭ finfaritan. La 9an de julio grupanoj alestis Esp-vesperon ĉe la hejmo de f-ino Saunders. Post sido ĉe lernolibro anoj plezurtempis kante-rakonte. La 15an, 7.30 ĝis 7.45 vesp., s-ro Bell, nia prez., parolis pri Esp. gramatiko el radiejo 3YA. Per penoj de nia sek-io ni aperigos raporteton monate en gazeto de la Junula Kristan-Asocio. Tio multe helpos dissemin en nia urbo. La 6an de aŭg. okazis monata E. vespero, ĉifoje ĉe la hejmo de s-ro Bell. Semajne la soc. ricevas el ambaŭ Insuloj de N.Z. leterojn, kies skribintoj deziras informon pri E. Ĉiurilate, kion faras Nordinsulaj grupoj? Anoncu k. reklamu! Sciigu la popolon pri la lingvo! Ne lasu onin eltrovi gruplokojn senhelpe, sed elserĉu tiujn, kiuj deziras direkton.

Ni bedaŭras perdon al unu el niaj plej ŝpartaj kunuloj, s-ro Wheeler, kiun trafis la malĝojigo, en tio ke lia edzino pasis ekster tiu ĉi mondvivo. La kun sia bela filinetto, forlasis nin

por veturi al Auckland, k. eventuale de tie al Hawai. Ni ĉiuj esprimas al li kondolencon pri lia doloriga kortranĉo.

Westralian Esperanto Society, Nigra Cigno Grupo, kunvenas ĉiun vendredon de 7.30—10 p.t. ĉe 197 Murray-st., Perth, kontraŭ Boan's Ltd. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretario, s-ino E. Sainsbury, "Noeline," Carrington-st., Maylands, W.A.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro A. Dewar; Sekretariino, S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu lundo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝejo Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin: Komunikaĵojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro J. Skurrie; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 pt. ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro A. E. Pryke; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 174 Burwood Road, Burwood.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str., proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Klement Kidd. Vicprezidantoj: Fraŭlino Rose Macpherson; M. Hyde. Sekretario: Fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane, Kvinslando (Queensland).

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.